

EKO 202270 kolekto lasta



Subtene al la regiona, landa kaj loka agado



Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

ENHAVO n-ro 70 > • ILEI • Eŭropo • Vjetnamio • Serbio < **decembro 12**

70 komunikoj en unu jaro - rekordo

Ni provos ĉesi pri komunikoj iom por doni al vi kaj ni pacon jarfine. Agrablajn festotagojn ni deziras, se vi efektive festas jarfine. La sekva komuniko raportos pri la AMO 96, okazonta en la 8-a Afrika Kongreso. Tio okazos en la 29-a de decembro aŭ en la nova jaro. Espereble akireblos informoj ankaŭ pri AMO 97 okazonta en januaro 2023 en la kongreso en Aŭstralio.

ILEI rigardas antaŭen kun granda elano

Jen malneto de labor-plano de ILEI j por januaro 2023-somero 2024. Rimarku, ke ĝi nomumas tujn, kiuj devos realigi la erojn. **Komentoj bonvenaj tra EKO!**

- * Restarigo de la administra sistemo de ILEI kaj prizorgado de la vivo de ILEI de la administra vidpunkto (Ahmad, Marija, Karine, Elena, Hamzeh, Renato)
- * Renovigado de la retejo de ILEI (Alessandra, Max Garcia, Cristina Bollini + estraro)
- * Dokumentado pri la renovigado de la retejo de ILEI (Alessandra kaj Cristina)
- * Kreado de la paĝoj pri IPR kaj JA en la retejo de ILEI (Jozefo, Stano, Cristina).
- * Regula prizorgado de la retejo de ILEI (Jozefo)
- * Publikigado de IPR (Jozefo, Ahmad, Fernando, Mirejo, Alessandra)
- * Publikigado de JA (Stano, Elena, Mirejo)
- * Ekzamenoj de ILEI/UEA (Karine)
- * Komuna Legado okaze de la Tago de la Libro (15-a de decembro) (Alessandra)
- * Dezirinda okazigado de plua eldono de Premio La Torre (Ahmad, Alessandra, Renato, Familio La Torre)
- * Realigado de libro pri Premio La Torre, kun la ISBN-kodo de ILEI (Radojica)
- * Publikigi la librojn de la Aktoj de la ILEI-simpozioj 2020-2021, se eble kun la ISBN-kodoj de ILEI (Fernando).
- * Publikigi aliajn librojn pri ILEI kaj/aŭ edukado, se eble kun la ISBN-kodoj de ILEI (Fernando, Alessandra).

- * Daŭre verki trimonatajn raportojn (Elena, Alessandra)
- * Teni bonajn rilatojn kun UEA (Ahmad) kaj TEJO (Fernando)
- * “Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lernejo en la tuta mondo”: plenumigi almenaŭ 10 realigojn de la leciono por neesperantista klaso (niaj membroj)
- * ‘Esperanto-kursaro Tibor Sekelj’: starigi kursojn en almenaŭ 5 landoj/lingvoj, en kiuj nun ne okazas retaj kursoj de iu ajn tipo (Ahmad kaj Renato)
- * Instruado en publikaj lernejoj: realigi la iniciaton ‘30 Oraj Horoj’ en Italio kaj bone dokumenti ĝin per libro, videoj, intervjuoj kaj artikoloj por faciligi imitadon (Laura, Bruĉjo, Alessandra)
- * Instruado en publikaj lernejoj: realigi iniciatojn similajn al la ‘30 Oraj Horoj’ en almenaŭ tri landoj krom Italio (niaj membroj) (vidu la bildon.)
- * ILEI-kongreso en Linjano (Laura, Bruĉjo, Fernando, Karine, Alessandra, LKK)
- * ILEI-simpozio de Linjano (Fernando aŭ Alessandra, depende de la elektita temo)
- * Sekva ILEI-kongreso 2024 (Laura, Karine + aliaj depende de la elektita loko)
- (SMG: Pensu pri Afriko, por sekvi en 2024 la Universalan Kongreson!)
- * Daŭre okazigi ĉiumonatajn renkontiĝojn de universitatanoj (Ahmad, Renato, Radojica, Fernando)
- * Daŭre okazigi ILEI-forumojn (Radojica)
- * Instruista trejnado dum la kongreso ktp. (Radojica kaj Laura).
- * Prizorgado de la jutuba kanalo de ILEI (Alessandra, Aristophio, Mirejo kun la helpo de Max Garcia)
- * Prizorgado de la aliaj retaj sociaj komunikiloj de ILEI (Didier Janot, Laura kaj aliaj).
- * Daŭrigado kaj perfektigado de la ‘Homa Ĉeno’; (Max Garcia, Alessandra, aliaj)
- * Prezenti Esperanton al almenaŭ 3 NROj, precipe pri paco, ter-savado, lingvaj rajtoj kaj minoritatoj (Ahmad, Max Garcia, Didier Janot)
- * Batali kontraŭ analfabeteco per instruado en almenaŭ unu lando (Ahmad)
- * Sendi observantojn al Unesko por videbligi niajn agadojn tie kaj klopodi akiri oficialan kunlaboran rilaton. Daŭre videbligi la projektojn jam plurlingve prezentitajn por la pasinta premio Hamdan (Kungfua Kuniklito, ‘30 Oraj Horoj’, Edukado.net) (Alessandra, Didier Janot, Max Garcia, Emmanuel Desbrières kaj aliaj)
- * Se eblas, partopreni en la venonta premio Hamdam pri edukado kun taŭga kandidato (Alessandra).
- * Pretigi varbadajn materialojn pri ILEI por Unesko ktp (Alessandra, Max Garcia, Bruĉjo, Didier Janot, Emmanuel Desbrières kaj aliaj).
- * Sendado de lernolibroj al Afriko (Renato, Karine)



La Eŭropa Parlamento pri multlingvismo

La klopodoj de la eŭropaj esperantistoj, kiuj faris proponojn kaj subtenis tiujn proponojn pri Esperanto la pasintan jaron en la tiel nomata Konferenco pri la

Estonteco de Eŭropo, ne estis vanaj. La Komitato pri Kulturo kaj Edukado de la Eŭropa Parlamento (CULT) ĵus publikigis gravan studon kun la titolo "La aliro al multlingvismo en la komunika politiko de Eŭropa Unio" (la aŭtoroj estas D-ro Michele Gazzola kaj 5 kolegoj), kiu citas Esperanton kiel logikan, vivantan lingvon. La studo taksas la lingvan politikon de Eŭropa Unio surbaze de profunda jura analizo kaj la uzon de la oficialaj lingvoj en 1,5 milionoj da retpaĝoj de 13 EU-instituciaj retejoj, kaj la lingvokapablojn de eŭropaj plenkreskaj loĝantoj. La studo estas elŝutebla ĉe:

[http://www.europarl.europa.eu/RegData/etudes/STUD/2022/699648/IPOL_STU\(2022\)699648_EN.pdf](http://www.europarl.europa.eu/RegData/etudes/STUD/2022/699648/IPOL_STU(2022)699648_EN.pdf)

Ne-oficialaj tradukoj en ĉiuj eŭropaj lingvoj estas haveblaj ĉi tie:

<http://www.europokune.eu/index.php?article9/multlingvismo-de-europa-unio-en-sia-komunikada-politiko>

En la paĝo 76-a la raporto konstatas, ke "Ne ekzistas komuna lingvo en EU parolata je tre bona nivelo (t.e. denaska aŭ scipova) de la plimulto de la loĝantaro" kaj en la paĝoj 84-85 estas emfazata la graveco de la lernado de duaj lingvoj, kaj estas citita kiel ekzemplo la programo "Multlingva Akcelilo", la plej voĉdonita inter la proponoj en la eduka sektoro en la Cifereca Plurlingva Platformo de la Konferenco pri la estonteco de Eŭropo en 2022. La programo Plurlingva Akcelilo montris signifan kaj rapidan plibonigon de la lingvokapabloj de 8- ĝis 9-jaraj lernejoj, kiuj akiris tiujn kapablojn unue lernante zorge elektitan, limigitan kvanton de vivanta, logika lingvo kiel Esperanto.

La Komisiono de UEA por Agado en Eŭropo kaj Eŭropa Esperanto-Unio dankas ĉiujn eŭropajn esperantistojn, kiuj subtenis niajn proponojn por Esperanto kaj aparte doktoron Michele Gazzola, kiu partoprenis la redaktadon de la nun aperigita raporto kaj invitas ĉiujn partopreni la estontan kampanjon por utiligi tiun mencion en nia informa laboro.

Vjetnama kurso

La redaktoro de [edukado.net](http://www.edukado.net) informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Tibor Sekelj
Gvidantonomo: Tran Thi Hoan
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Hanojo, Vjetnamio
Aldoninto: Ĝojo

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27491>

Esperantologio por entuziasmoj

Nome de CED, mi ĝojas anonci ke ĵus aperis nova numero de la revuo 'Esperantologio / Esperanto Studies'. La numero 3(11), de 2022, estas disponebla en la retejo de CED <https://interlingvistiko.net/interlingvistiko/> - pli precize ĉe

<https://interlingvistiko.net/interlingvistiko/esperantologio-esperanto-studies-2022/>

La ĉi-jara revuo-numero inkluzivas la jenajn artikolojn kaj libro-recenzojn:

- Humphrey Tonkin - Antaŭparolo
- Sabine Fiedler - Ĉu Esperanto fariĝas pli kaj pli angleca?

- TIDA Syuntarô - Kial multas adjektivoj en Esperanto? Komparo kun la korea, la japana, Dom, Tokpisino kaj aliaj lingvoj
- Wim Jansen - Enkorpigado kiel vortfara metodo en Esperanto
- Otto Prytz - Vortfarado per dishako de radikoj kaj kunluo de la dishakaĵoj
- Humphrey Tonkin - Esperanto: esploraj prioritatoj
- Guilherme Fians - Kontraŭ la esceptismo de Esperanto(logio): unuapaŝa etnografia aliro al tiu studkampo
- Mark Fettes - Recenzo de la libro: Heller, M., McElhinny, B. (2017). Language, capitalism, colonialism: Toward a critical history
- Sébastien Moret - Recenzo de la libro: Collinson, W.E. (2019) La homa lingvo / Human language

Kursoj en Serbio

- La startmotoro de la kursoj estis Jovan Zarković, la prezidanto de SEL (Serbia Eo-Ligo). La administra plumotoro estas LASLO Aranka, komitatano de ILEI kaj de post baldaŭ sekciestro de ILEI-RS.
- La kurson A1, du fojojn semajne po unu horo, gvidas alterne Jovan Zarković, lau kursmaterialoj kiujn li mem kreis, Kaj Aranka Laslo lau la rektmetoda lernolibro de Stano Marček kaj lecionoj de Anna Löwenstein en formo de video prezentaĵoj.
- Mi gvidas A2 asistate de Aranka, du fojojn semajne po unu horo, lau kursmaterialoj kiujn mi kreas por ĉiu leciono konforme al antaŭaj (tre diversnivelaĵ) scioj kaj aktualaj atingoj de la diversfona kursanoj.
- La kurson B, unu horon unufoje semajne, alterne gvidas Živanko Novakov (lau Paŝoj al plena posedo) kaj Zlatoje Martinov (pri E-movado kaj kulturo, lau propraj instrumaterialoj).
- La instruhoroj estas registritaj kaj poste reuzeblaj por tiuj, kiuj ne povis partopreni, aŭ deziras refoje aŭdi la lecionon.

- Radojica Petrović, Serbio, Estrarano de ILEI

===== vortoj: 920 =====

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis majo 2022 (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@ce@gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.